

Spiritisma literaturo en Esperanto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 577/92, 1982 aprilo 22 kaj 28.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-90/SRI-1982-90-2-577-Claude-kaj-Andree-GACOND-Spiritisma-literaturo-en-Esperanto.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Unu el la plej produktivaj produktantoj de libroj en esperanto estas la brazila Spirita Eldona Societo Lorenz, kies sidejo troviĝas en Rio de Janeiro. La lasta libro-katalogo de tiu spiritisma eldonejo proponas pli ol kvindek titoloj de romanoj, esperantigoj de sanktaj verkoj kiel la sanskrita Bhagavad-Gita, de moralaj eksplikoj kaj de eseoj, lernolibroj, almanakoj. ktp.

A.- Multaj el tiuj verkoj estis diktitaj de spiritoj inter kiuj troviĝas nomoj de la franca verkisto Victor Hugo, de la hinda poeto Rabindranath Tagore, de la romia senatano Publius Lentulus Cornelius kaj de multaj aliaj mortintoj, inter kiuj eĉ troviĝas la aŭtoro de nia lingvo, doktoro Esperanto.

Cl.- En la spiritisma literaturo kunvivas verkoj de surteraj vivantoj kaj de transmondaj spiritoj, kiujn intervjuas mediumoj. La legantoj de tiuj ĉi atestaĵoj, kiuj miksas la surterajn rememorojn kun la transmondaj travivaĵoj, devas havi fortan personecon por konservi sian raciecon kaj ne miksi la realecon kun fantaziaj rakontoj.

A.- La adeptoj de la spiritisma literaturo akiras karakterizan mondpercepton: ili havas la senton esti revenintaj sur la Tero por efemera reenkarigo kaj havas la certecon, ke la morto nur estas transiro en same realan mondon, kie ili retrovos siajn familianojn, amikojn kaj malamikojn. Kaj ili kredas, ke inter la du mondoj interkomunikoj konstante okazas pere de privilegiaj homoj, kiujn ili nomas mediumoj.

Cl.- Kiel la sciencfikciaj verkoj metas vin en tute apartan etoson, ankaŭ la atestaĵoj de la spiritisma ĝenro tion faras. Jen per citaĵoj el rakonto, kiun oni trovas en la verko Ha, se mi sciis... atestoj de diversaj spiritoj intervjuitaj de Rose dos Anjos, ideon pri tiu ĉi ĝenro. La rakonto titoliĝas Ni estas ree utilaj. Ni citas:

A.- "Kiel instruistino mi pasigis grandan parton de mia vivo dediĉitan al la hejmo kaj al la ekzercado de la instruado. Mi tre ŝatis miajn gelernantojn. El multaj el ili mi retenas agrablajn rememorojn...

Cl.- La instruado estas kreda profesio. Mi tiom ŝatis ĝin, ke, se estus al mi permesate reveni al la Tero, mi volus rekomenci ĉion, refoje.

A.- Eksiĝinte, mi volis dediĉi min pli al la hejmo kaj al miaj familianoj. Sed la ripozo mallonge daŭris, kiel oni ĉiam diras: Kio estas bona, tio daŭras mallonge".

Cl.- Malsano venis. Mi tre suferis kaj havis timon morti. Mi ne estis preparita... kaj la koncepto, kiun mi havis pri la morto, estis neniel bona.

A.- Mi luktis multe sed la fatala tago alvenis. Mi pensis, ke ĉio finiĝos por mi. Mi nutris egan ĉagrenon pro tio, ke mi lasis edzon kaj filon kaj foriris sola al ia ajn nekonata loko...

Cl.- Mi trapasigis tempon da suferegoj, multon da doloroj kaj profundan angoron. Mi sentadis min tre senkomforta pro tio, ke mi ne sciis, kie mi estas. Mi transiris de stadio al alia, ne

perceptante tion. Mi atendadis morton, sed mi ne mortis, mi daŭris vivanta kaj suferanta pli, ol antaŭe.

A.- Mi nun estis sola, neniŭ el mia familio staris apude. Per Dio! Mi ekdeziris morti fakte. Tio estis troa suferado, ne estis plu vivado.

Cl.- Sed, ĉar kiu ĉiam bonfaras, al tiu ne mankas amikoj ĉe horo de senespero, mi komencis ricevi vizitojn de eĉ nekonataj de mi instruistinoj...

A.- Mi ne estis plu tiom sola. Iom post iom mi vigliĝis kaj sukcesis eĉ levi min sen ies helpo.

Cl.- Mi partoprenis gajajn kunvenojn, kiuj enhavas muzikaĵon, legadon, teatraĵon, sed ĉiam ekvolanta scii, kiam mi reiros hejmen...

A.- Kiam mi ne plu eltenis min kaj demandis al unu el ili, kiun mi kredis la direktorino de 1^a lernejo: - Ĉar mi estas sanigita, mi povos do iri hejmen?

Cl.- Tiam, tre pacience ŝi provis klarigi al mi, kio okazis. Ne tuj mi akceptis! Kial nu oni mortas sed partoprenas ĉiujn tiujn kunvenojn? Kio do estas morti? Mi estas vivanta kaj volas reiri al mia domo!...

A.- La direktorino, ĉiam bonhumora kaj trankvila, respondis al mi:

- Ivonice, filino, vi ne apartenas plu al tiu hejmo, tie sur la Tero. Nun via hejmo estas tie ĉi. Ĉu vi ne vidas, kiel ĉiuj instruistinoj estas feliĉaj ĉi tie? Vi ankaŭ povos esti feliĉa; sufiĉas nur, ke vi ne plu deziru reveni al via hejmo sur la Tero... Ni ĉiuj, nune, estas spiritoj, ni forlasis niajn fizikajn korpojn kaj ĉiujn iliajn malsanojn sur la Tero. Vi ne estas plu malsana kaj povos dediĉi vin al via plej amata laboro. Ĉi tie estas ĉiam multo por fari.

Cl.- Komence, mi ploris ade; mi provis apartigi min el ĉiuj, dezirante suferi miajn proprajn tristaĵojn nur sola. Ili denove komencis viziti min por min enkuraĝigi, ĉiam dirante, ke mi povos esti tiom feliĉa, kiom multaj el ili, kiuj multe pli frue ol mi estis lasintaj edzon kaj gefilojn. Tie ĉi, por ke oni estu feliĉa, oni dependas de si mem, de sia klopodo kaj bonvolo.

A.- Mi provis reserĉi la kunvivadon de la amikinoj kaj la ekzercadon de la plej nobla kaj altstara profesio - tiu de la instruado.

Cl.- Kaj la rakonto konkludiĝas per admono al la instruistinoj, kiuj ankoraŭ troviĝas sur la Tero, ke ili rezervu kelkajn horojn de sia orvalora tempo por la legado de spiritismaj verkoj, ke ili ne alvenu la transtomban mondon tiom senspertaj, kiom estis la interjuitino.

A.- Tiu ĝenro havas predikan karakteron kaj ŝajnas, ke la intervjuatoj pli malpli travivis samajn angorajn momentojn, ĝis kiam ili kapablis forlasi specon de hospitalo aŭ reedukejo, kien la morto ilin alkondukis. En tiu transmondo ili renaskiĝis kun siaj pasioj, karakterizaj trajtoj kaj kun sia sekso kaj aĝo. Kaj ŝajnas, ke en la transmondo oni trovas ekvilibron plenumante laboron profite al la ceteruloj. En tiu ĉi rakontaro la priskriboj de la surteraj rememoroj estis pli realismaj ol tiuj de la transmonda vivo, kiu restas iel abstrakta.

Cl.- Oni sin demandas, kial tiuj spiritoj ne ankaŭ rakontas kun iom da precizo pri la transmondo mem. Sed verŝajne en aliaj verkoj tiun ĉi precizecon oni trovas. La verko Ha! Se mi scius... estas nur eduka admono por tiuj, kiuj neniam ĝis nun interesiĝis pri la problemoj de la morto.

A.- Se tiuj problemoj vin interesas, en la esperanto-literaturo vi povos legi la eldonaĵojn de la Spirita Eldona Societo Lorenz.

Cl.- Ĉu konvinkigaj? Al ĉiu mem decidi. Aŭ kontroli per la morta eksperimento!

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la spiritisma literatura ĝenro. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014*